



# Eventoj

Redakcia adreso:  
Budapest, pk. 87.  
H-1675, Hungario  
Telefono kaj telefakso:  
(+36-1) 1288-258

Internacia Sendependa Revuo pri la Esperanto-Movado

aŭgusto (1) - '92

## Rekorda e-kunveno en Vieno!

Ŝajne Vieno situas en la koro de Eŭropo, ja al la ĉi-jara UK de UEA aliĝis pli ol 3.000 esperantistoj! Neniam okazis tiom multnombra e-kunveno en okcidenta Eŭropo depost la dua mondmilito!!!

Ĉie en la granda kongresejo *Austria Centro Vieno* svarmis esperantistoj, la kavalado kaj la dumtaga etoso estis vere impona!

### Gratulon al Vienanoj!

Kvankam multaj organizaj aferoj estis solvitaj nur en la lastaj tagoj, la entuziasma organiza grupo de vienaj esperantistoj faris la maksimumon. Malgraŭ ilia negranda nombro kaj oni-dira nesperteco en organizaj aferoj preskaŭ ĉio estis bonege solvita. Gratulojn kaj dankojn al ili, kaj al Nikola Raŝiĉ, la komisiito de C.O.!

### Nova estraro de UEA!

Dum la kongreso estis elektita la nova UEA-estraro:

**John Wells**, el Britio, universitata profesoro, - prezidanto, zorgos pri la ĝenerala gvidado de UEA kaj pri la reprezentado.

**Ian Jackson**, el Britio, juristo, - ĝenerala sekretario.


**Ulrich Lins**, el Germanio, univ. prof., - vicprezidanto, zorgos pri la regiona kaj landa agado.

**Mark Fettes**, el Kanado, ĵurnalisto. - Taskoj: informado, KER (komisiono pri eksteraj rilatoj), CED (Centro de E-Dokumentoj).

**Hans Bakker**, el Nederlando, inĝeniero, organizisto. - Taskoj: financaj kaj administraj aferoj de la Centra Oficejo.

La nova estraro havas abundajn taskojn, kaj pezan respondecon. Tre multo dependas de ili, kaj la postuloj de esperantistoj estas altaj...

Ni deziru multan energion, kaj multajn sukcesojn al ili!



### Tamen...

Krom aprezi la verajn rezultojn de la viena kunveno, apenaŭ eblas forgesi plurajn malĝojigajn aferojn. Estis ege malentuziasmiga la "jarkunvenoj" de pluraj t.n. "fakaj asocioj", la komitato denove profunde kaj longe okupiĝis ĉefe pri la "vosto de kat", ne estis nokta kunveno por la meza kaj juna generacio, la konduto de e-istoj simple ŝokis la kongresejan oficiararon, ktp. Al la ĉi-temaj impresoj ni revenos en la postaj numeroj...

Por havi detalajn informojn pri la vienaj okazintaĵoj vi certe povos legi en plejmulto de naciaj e-revuoj, aŭ vi povas peti senpagan provkzempleron de "Heroldo" (via N. Sandre 15, I-10078 Venaria Reale, TO, Italio), kiu dediĉas sian septembran numeron nur por la UK.

László Szilvási

P.S. Niaj fotoj pri la UK mankos ĉi-foje, ĉar en la lasta kongresa vespero "malaperis" nia teko kun la fotilo, filmoj, kaj kun kelkaj dokumentoj...

## Aperos Katalogo de planlingvaj periodaĵoj

La unua lernolibro de esperanto aperis somere 1887 en Varsovio.

La unua periodaĵo en esperanto aperis la 1an de septembro 1889 en Nurenbergo.

En Budapeŝto fondita "Rondo Takács" jam dum pli ol kvin jaroj intense elserĉadas informojn kaj pruvojn pri la planlingvaj periodaĵoj aperintaj diversloke sur nia Tero. La elirdato estas la 1a de septembro 1889, kiam en Germanio aperis la unua e-gazeto. Ĝia titolo estis "La Esperantisto" (kun subtitoloj en lingvoj germana kaj esperanto) kaj fine de 1889. Ĝi havis 113 abonantojn, plejparte en la cara Rusio.

Ekde tiu tempo forpasis jam pli ol cent jaroj kaj en unuopaj landoj iom post iom komencis aperadi gazetoj, revuoj, bultenoj, prospektoj kaj diversaj aliaj informmaterialoj en (aŭ pri) esperanto kaj aliaj planlingvoj - ĝis la plej novaj projektoj.

La trimembra Rondo Takács - gesinjoroj Luis M. Hernández Yzal kaj Ana Molera Ur-

gellés (ambaŭ el Hispanio) kaj d-ro Árpád Máthé (Hungario) - starigis al si gravan, malfacilan taskon titolitan "La bibliografiaj esploroj pri periodaĵoj en aŭ pri esperanto kaj aliaj planlingvoj" kaj fini tiun postuleman laboron per la eldono de (laŭeble kompleta) katalogo. Kun la helpo de gesamideanoj el multaj landoj ili sukcesis kolekti jam pli ol dek mil titolojn (resp. ĉirkaŭ 40 mil jarkolektojn). Krom tio pliaj centoj da titoloj bezonas ankoraŭ precizigon de eldonlokoj, datoj de aperigo k.s. Sed jam nun oni povas konstati, ke proksimume 95% da periodaĵoj estas en aŭ pri esperanto. La resto apartenas al volapük, ido ktp.

La meza vivolongo de e-periodaĵoj estis ĉ. 4 jaroj. Kaj ankoraŭ unu interesa informo: dum ĉiuj kvar tagoj komencis aperadi aŭ formortis unu periodaĵo en aŭ pri esperanto.

Menciinda estas la fakto, ke la unuan liston de e-periodaĵoj kompilis en 1913 la kataluna publicisto Johano Amades Gelats (nask. la 23-an de julio 1890). (daŭrigo sur la p. 4.)

memore al István Szerdahelyi

## Internacia Lerneja Konkurso

Post dujara sukcesa enhungaria interlerneja E-konkurso ni denove lanĉas por la sekva lernejarlo la poento-kolektan konkurson, kiu ekde nun portas la nomon de profesoro István Szerdahelyi. Post la enlandaj sukcesoj ni anoncas la konkurson internacia, kaj jene ni alvokas la lernejarojn de iu ajn lando lernantajn esperanton partopreni en tiu konkurso!

La kultura komisiono de la urbo Kecskemét (kie troviĝas la administra centro de tiu ĉi konkurso), vidinte niajn atingojn en la lastaj du jaroj, asignis por niaj konkursoj 20.000 forintojn. Pere de tiu sumo en tiu ĉi jaro ni povos do kovri la poŝt-kostojn de niaj eksterlandaj amikoj el Eŭropo el landoj kun netranspagipovaj valutoj, kaj restos modesta sumo, per kiu ni premiis la plej diligentajn konkursanojn.

daŭrigo sur la p. 2.

## Internacia Lerneja Konkurso (daŭrigo de p. 1.)

Aliĝi la lernantoj povas ne nur ĉe la komenco, sed iam ajn dum la studjaro. Dum la tuta lernojaro aperos 7 numeroj, kaj laŭ la regularo estas akireblaj maksimume  $7 \times 20 = 140$  poentoj. Komputilo registras ĉiujn aliĝintojn kaj iliajn poentojn. Solvo-sendintoj ĉiam ricevas kun la korektitaj solvofolioj ankaŭ la komputilan liston.

Ĉiuj taskofolioj aperos en aparta rubriko de la gazeto Eventoj. Mi denove alvokas, kaj bonkore rekomendas la partoprenon al ĉiuj lernemaj geknaboj!

Géza Kurucz

*Bedaŭrinde nia gazeto ankoraŭ ne atingas ĉiujn e-instruistojn kaj lernejojn, do ni pejas de Vi, la Leganto helpon por informi viajn konatojn, e-instruistojn, gelernantojn pri tiu ĉi konkurso! La taskofoliojn (ekde oktobro) oni trovos en EVENTOJ, do ne estas necese aparte peti ilin de G. Kurucz. La solvojn kun la necesaj datumoj resendu al la adreso, kiu aperos sub ĉiu task-folio!*

La Red.

## Regularo de Internacia Konkurso por Lernejoj

1. En la konkurso povas partopreni **nur lernejoj** ĝis la aĝo de 19 jaroj. Junuloj, kiuj lernas esperanton en eksterlandaj kursoj aŭ memstare, rajtas alsendi siajn solvofoliojn, sed ili **ne eniras** la oficialan liston, t.e. ili partoprenas en ĝi **eksterkonkurse**. Oni povas aliĝi al la konkurso ĉe ioma ajn numero.

2. La konkurso havas **du kategoriojn** laŭ aĝo: la unua ampleksas lernantojn ĝis la jaro de 14 jaroj, la dua - lernejojn inter la aĝlimo de 15 kaj 19 jaroj. Ambaŭ kategorioj havas du grupojn, nome: tiun de **komencantoj (=K)** kaj de **progresintoj (=P)**. La unuan formas geknaboj kun ne pli ol du lernojaroj en esperanto, al la dua apartenas ĉiuj, kiuj lernas esperanton dum pli ol du jaroj. Entute ekzistas do **kvar** grupoj, **po du** en ambaŭ kategorioj.


3. La konkurso ĉiam daŭras unu lernojaron: de oktobro ĝis majo. En la daŭro de la lernojaro **ĉiumonate** aperas taskofolioj por ambaŭ kategorioj (entute 7 folioj jare). La unua estas sendita al tiu lernejo, kiu ĝin petas per letere kaj almetas poŝtmarkojn aŭ respondkuponon por la respondo. Ĉiu folieto enhavas 6 ĝis 10 simplajn tasketojn, per kies senerara solvo ĉiufoje **20 poentoj** estas aki-

reblaj. La solvoj estu skribitaj en esperanto sur simpla paperfolio en la formato de duona tajpfolio (A/5) kaj sendita al la adreso, donita sur la taskofolio mem (*redaktinto de la koncerna taskofolio*). Ĉiu taskofolio estas redaktita de alia pedagogo kaj aperas en la dusemajna revuo **EVENTOJ**.

4. En la konkurso povas partopreni nur lernantoj, sur kies solvofolio la E-instruist(in)o atestas per sia **subskribo** kaj **stampo** de la lernejo, ke la konkursanto estas lernejo. La solvofolio enhavu la **kompletan nomon** de la lernanto, la **kategorion** (**B=bazlernejo**; **M=mezlernejo**) kaj la **grupon** (**K,P**), **ekz-e: M/K (mezlernejo, komencanto)**. Por konkursantoj el lernejoj sen E-instruisto estas bezonataj lerneja stampo kaj la subskribo de la klasestr(in)o.

5. La instruisto de esperanto kolektas ĉiujn solvofoliojn de sia lernejo kaj sendas ilin en komuna koverto **ĝis la indikita limdato** (validas la poŝta ŝtampo) al la donita adreso. Solulo mem sendas sian solvon. Por ricevi la korektitajn solvojn kaj por ricevi novajn taskofoliojn la instruisto sendas kun la solvoj poŝtmarkojn aŭ respondkuponon. Kun la korektitaj solvoj ĉe-mete ĉiam troviĝas la ĝusta solvo de la antaŭa numero kaj la kompleta listo de la konkursantoj, kun indikoj de ties lernejoj kaj akiritaj poentoj. La nomoj de la plej sukcesintaj estos publikigitaj en la gazeto **EVENTOJ**, kaj voĉlegataj en la E-programo de la Hungara Radio.

6. Post la lasta numero la plej sukcesaj konkursantoj estos **premiataj**.



"Plimulto de rusoj subtenas REU"

## Tajperaro kaj inversa senco

En la numero julio (1)-92 en la rubriko "**Organizaj demandoj**" aperis tri artikoloj pri la ekesto de du paralelaj organizoj REU kaj REA en Rusio.

En la artikolo de Andrej Ananjin, komenta la fenomenon el la vidpunkto de REU, enŝteliĝis tajperaro, kio ŝanĝis la senco de la

frazo al plene kontraŭa. Do, la antaŭlasta frazo de la antaŭlasta alineo korekte tekstas jene:

"La plimulto de la rusia esperantistaro malgraŭ tio plu preferas subteni la tradician organizon."

Ni petas pardonon de Andrej Ananjin!

Redakcio de **EVENTOJ**

## Opinioj

### Pri la krevovo de UEA

Tiu frontpaĝa artikolo kiu provis kredigi sin rakonto pri la historio de la evoluo de la simboliko en la Esperanta movado estas plena de eraraj asertoj. La aŭtoro tre propagandis por sia deziro, kun la ŝajnigo, ke li racie argumentas. Jen mi citas: "multaj pli kaj pli sentis la neceson de radikala ŝanĝo, sed ĝis 1986. la movado esence ne povis liberiĝi de la jam tre ĝenaj tradicioj".


Tia estas ja ĵurnalista taktiko por kredigi sin argumenton ĝusta. La cititaj asertoj estas plene eraraj.

Ne multaj pli kaj pli sentis neceson de ia ajn ŝanĝo. Fakte en la daŭro de tiuj jaroj mi eĉ ne unu fojon aŭdis plendon, kaj oni neniam eĉ unu fojon al mi esprimis "neceson de radikala ŝanĝo". Povas esti, ke inter la amikoj de la aŭtoro iuj novaj esperantistoj, senspertuloj, sentis tion. Tial li opiniis, ke lia amikaro estas la tuta mondo.

La vorto "liberiĝi" estas alia nevera kaj ĵurnalista vorto por kredigi, ke la movado estas iel katenita. Ĝi ne estis, kaj ne estas. Denove la vorto "ĝenaj" tradicioj. La tradicioj ne estis al mi ĝenaj. Al kiu? Eble al tiuj, kiuj ne povis vidi la valoron de kontinuo kaj daŭrado, de establita simbolo. Eble oni povus esperi pri ia renomo akirita per disfamigo de io nova, eĉ se malpli dezirinda.

Ankaŭ mi konstante deklaras, ke por fari progreson oni devos ofte fari ŝanĝojn. Sed nur de malbono al bono. Kaj zorge. Kaj kun konsento de la homoj tuŝotaj de tiu ŝanĝo.

La simbolo de UEA, proponita nur por la jarcenta festado jam faris sian taskon. Oni metu ĝin en la historiajn librojn. Ĝi tute ne havas valoron, ĝi tute ne estas simbolo pli komprenebla ol la stelo (eĉ inverse) kaj neniel estas tiom facile desegnebla kiom la stelo. "La elasteccon de identa grafika simbolo..." Ĝi ne estas elasta! Ĝi ne estas identa!



Neniu simbolo estas utila, se oni ne komprenas ĝian signifon. Se eĉ la esperantistoj ne scias la signifon de la rompita ovo, kiel ni povos esperi, ke la tuta mondo ĝin rapide lernos? Kaj ĉar la esperantistoj jam forrifuzas ĝin, tiuj novicoj en la arto de publiko kiuj persistas trudi ĝin al la movado, faras nur malhelpon.

Nur la vorto mem **ESPERANTO** estas nia simbolo. La stelo verda, ju pli simpla des pli bona, estu nur rekonilo inter ni.

Will Green, Britio.

## Faka aplikado

### Taŭgaj agadeblecoj por IKEF-anoj

Ni promesis publikigi la taŭgan agadeblecojn, aparte por novaj membroj kaj interesigantoj. Kvankam la statuto de IKEJ jam difinas la ĉefajn agadterenojn (vidu la suplementon de *EVENTOJ julio (1)-92*), ni havas kromajn praktikajn spertojn. El tio montriĝis jenaj agadoj fareblaj kaj utilaj:

- Terminara laboro. Kreado de terminaroj pri komerco/ekonomio. Anoncu vin al la Terminara Sekcio, gvidanto s-ro Wiersch (IKEF 19).
- Verkado de fakaj artikoloj pri ekonomiaj temoj; prezentado de ili en MONATO, aŭ en alia esperantlingva revuo.
- Havigo de reklamanoncoj de entreprenoj al esperantistaj revuoj;
- Etikedservo. Prepari la esperantlingvan version de plurlingvaj etikedoj, korespondadoj aŭ uz-instrukcioj kaj oferti tion al fabrikistoj.
- Tradukservo. Traduko de esperantlingvaj

ofertoj kaj aliaj korespondadoj inter esperantistoj kaj neesperantistoj. (ekz. persone konataj komercistoj);

- Serĉo de esperantistaj kontaktoj por sia ĉiutaga laboro (ekz. profesia aĉetisto serĉu vendistojn);
- Kunlaboro kun esperanto-turismo.
- Kontakto al Komercaj Ĉambroj. (Vidu la agadon de s-ro Gilbert en Bar le Duc, "Kiu faras kion?");
- Viziti grupe fabrikojn aŭ instituciojn (ekzemple dum la UK, sed ankaŭ dum aliaj aranĝoj);
- Agado de universitatoj fare de studento pri ekonomiko.

La kampo komerco/ekonomi(k)o estas giganta; sed ĝi estas fruktodona. Ni rekomendas ankaŭ, ke ĉiu faru ĉefe tion, kio rilatas al sia profesio kaj ĉiutaga laboro, ĉar tie kiel agnoskita spertulo, li/ŝi efikas konvinke al siaj apuduloj.

*La Estraro de IKEF  
laŭ La Merkato n-ro 37.*

*Kvankam en la artikolo temas pri la agado de IKEF membroj, ni opinias, ke tre multon el ili povas fari ankaŭ aliaj esperantistoj.*

L.S.


### Interhelpo

La kooperativo de esperantistoj *INTERHELPO* serĉas kunlaborantojn por disvolvi komercan aktivajn kaj proponas avantaĝajn kondiĉojn de provizio ĉe vendado de turismaj ekskursoj kaj porinfanaj gazetoj, kiujn ĝi eldonas. Ĝi ofertas avantaĝan ŝancon por diligentaj unuopuloj aŭ por kluboj de esperantistoj.

Kontaktadreso: *INTERHELPO*, pk.44, CS-150 00 Praha 5, tel., fax: +42-02-542993.

*INTERHELPO* ofertas ankaŭ siajn servojn en la tutjare malfermita kaj bone ekipita turisma tranoktejo en Praha, proksimume 150 m de la metroa stacio Radlická en du-kaj trilitaj ĉambroj. Prezo por unu persono kaj tago estas 60,- Kčs.

*el Starto 2/92.*



# BONVENON!

## Komerca aplikado

Pri negoco en Germanio petu informojn ĉe:  
s-ino Irene Sosnoski,  
Brühl 13, DO-7241 Grosbardaŭ, Germanio.  
*LM n-ro 36.*

Mendu katalogon de gladioloj! Estas mendblaj pli ol 700 malmultekostaj gladioloj. La katalogo kostas nur 1 USD!

*Arvo Toomsalu,  
EE-3523 Varbola 83-15, Estonio.*

La Komerca Fakgrupo Radu (KFR) ofertas laborskipojn (ekipistojn) por riparado kaj konstruado de domoj, ofertas varojn el la malpeza industrio, tekstilaĵoj, trikotajoj, vestaĵoj, ilmaŝinoj, mebloj, mastrumaj vitajoj, viandokonservojn ktp. Bv kontakti:

*Radu Konstantin, str. Vasile Alecsandri 2/A,  
R-5800 Seceava, Rumanio.  
Telfakso: +40-987-27991.*

Mi ofertas por eksporto ŝaf-lanon, kaprolanugon kaj mielon de alta kvalito.

*Vladimir Horosilov,  
ul. Partizanskaja 13, Soloneŝnoje,  
Altajskij kraj, 659672, Rusio.*

Kiu volus financi aŭ kune konstrui turismajn restadejojn en pitoreskaj lokoj de la montaro Altaj, aŭ interŝanĝi turismajn grupojn? Skribu al:

*Anatolo Gonĉarov,  
selo Matveevka, Soloneŝenskij r-n,  
Altajskij kraj, 659672 Rusio.  
el LM julio/92.*

### IKS-bazaro

Zagreba firmao "Bioaromatica", kiu produktas eter-oleojn, deziras kontakti kun fakuloj pri aromterapij.

*Kontaktadreso: Internacia Kultura Servo,  
pp 499, HR-41000 Zagreb, Kroatio/Hrvatsk  
el Letero el Zagrebo, 3/92.*

## Komuna projekto de UEA, ILEI kaj EEU

Ĉu vi jam aŭdis pri la projekto "*Komunikado en la Eŭropa Komunumo*", lanĉita de UEA, ILEI kaj Eŭropa Esperanto-Unio?

Inter aliaj faktoj tiu projekto konstatis, ke la tradukcostoj ĉe la EK estas ĉ. 697.820.000 Ekuoj!!! Se vi interesiĝas pri tiu projekto, mi volonte nomas la landan kunlaboranton. La broŝuro de la projekto estas akirebla ĉe la UEA-libroservo.

*Volker Hank,  
Lindenstr. 2, DW-6425 Lautertal-Hoergenau,  
Germanio.*

*Compuserve: 100021,3033*

*Internet: vogelsberger@dcfged.das.net  
laŭ La Merkato n-ro 37.*

## Sindikatismo

Por plibonigi agadon en la sindikataj medioj, i.a. en Eŭropo, neprus esperantigi la 10-lingvan "Glosaron de la labormondo kaj de la sindikata movado", kiun eldonis la Eŭropa komisiono.

Kiu pretus kunlabori en tiu tasko, sin turnu al:

*FGTB-Esperanto,  
3 rue des Brasseurs, B-5000 Namur, Belgio  
el Franca Esperantisto, marto/92.*

## Komercaj anoncoj en e-revuo

En nacilingvaj gazetoj ĉ. la duono de la paĝoj estas okupata de komercaj anoncoj. Tio estas la ĉefa enspezofonto por la eldonejoj.

Kontraŭe, la esperanta gazetaro enhavas malmultajn, plejofte pormovadajn anoncojn.

La revuo *MONATO*, pro sia internacia legantaro estas interesa reklamilo por firmaoj, kiuj deziras konigi sian nomon kaj siajn produktojn en la tuta mondo. Se en *Monato* regule aperas tiaj anoncoj, firma financa bazo estas garantiata. Krome, tio ebligas pli favorajn abonprezojn por malriĉaj landoj.

*Roland Rotsaert, IKEF-estrarano,  
laŭ La Merkato n-ro 37.*



Por la (internaciaj) e-revuoj la reklamenspezo vere estas elementa bezono. Kaj ni notu, ke ankaŭ *EVENTOJ* estas internacie legata gazeto... Por ebligi la abonon de *EVENTOJ* el ne-transpagipovaj landoj, ni vere bonvenigus la kunlaboron, la anonc-akiran helpon kaj de *IKEF*-anoj, kaj de ĉiu esperantisto. Tio povas esti profitiga ankaŭ por la kunlaboranto, ja parton de la akirita reklam-enspezo li ricevos kiel maklerajo... Pliaj detaloj en iu baldaŭa numero.

*Szilvási László*

## Katalogo de planlingvaj periodaĵoj

daŭrigo de la p. 1.

Kaj la unua katalogo de la esperanto-gazetaro aperis en Jablonné nad Orlicí (CS) en la 1934-a jaro. Kompilis ĝin la hungara dentokuracisto d-ro Jozefo Takács (nask. la 24-an de julio 1890). Lian nomon transprenis sur sian ŝildon la supre menciita 3-membra hispana-hungara laborgrupo.

La multsignifan taskon en la plivastigado de esperanto (krom gazetoj, revuoj, bultenoj kaj informiloj) plenumis ankaŭ e-rubrikoj kaj kursoj de esperanto en nacilingvaj gazetoj kaj fakaj revuoj diversloke en la mondo.

La elserĉado de iam eldonitaj kaj dume forgesitaj planlingvaj periodaĵoj plue daŭras. Certe ne ĉio estas jam retrovita kaj enlistigita.

Kiel urĝa montriĝas la tasko: zorgeme traŝerĉi ne nur arkivojn de ĉiuj e-asocioj, kluboj, eldonejoj ktp., sed la unuopaj gesamideanoj trarigardu ankaŭ siajn proprajn kolektojn kaj arkiv(et)ojn. Pri ĉio trovita koncize informu la universitatan docenton

**d-ro Árpád MÁTHÉ**

**H-1125 Budapest, Tusnádi u. 14., Hungario,**

aŭ la aŭtoron de ĉi tiuj linioj. Ni interesigias pri ĉiuj periodaĵoj en- kaj eksterlandaj, aktualaj same kiel malnoviĝintaj, pri kompletaj jarkolektoj kaj pri unuopaj ekzempleroj de gazetoj, revuoj, informiloj, bultenoj, gazet-eltranĉaĵoj kun e-rubrikoj - ja eĉ difektitaj, se estas legeblaj almenaŭ la titolo, eldonloko kaj la jaro de la aperigo. (Por komenco sufiĉos, se vi informos nin pri tio, kion vi trovis aŭ posedas.) Anticipan dankon pro la celkonscia, daŭra kunlaboro!

*Ján Lamacka,*

*CS-911 01 Trenčín-Juh, ul. Halašova 8/1,  
Ĉeĥoslovakio.*

## Eŭropa akcepto

Lastan jaron, en la Eŭropa Domo de Lille (Francio), Thierry Leleu, konsilanto ĉe la franca ambasado en Bruselo, amike akceptis 60 belgajn kaj francajn esperantistojn. La diplomato tiam diris kelkajn frazojn en Esperanto, lingvo kiun li eklernis antaŭ 18 jaroj.

Komence de majo 1992, T. Leleu prelegis pri "Eŭrokratio" kaj denove menciis Esperanton, antaŭ membroj de la Eŭropa Movado kaj aliaj interesuloj.

*Laŭ la informilo  
"Mallonge" 8/92.*



## Movado

### Neprofesieco vekas suspekton

La mezlernejo André-Laurendeau, en Longueuil, Kanado volas internaciigi kaj restrukturigi sian instru-programon. Ĉar ili estas plene malfermaj por instrui esperanton, du estraranoj de E.S.K. (Esperanto-Societo Kebekia) iris tien por prezenti la aferon. Sed ilia nesalajreco kaj entuziasmo vekis suspekton: Ĉu tio ne estas iu sekteca afero?

*laŭ "La Riverego", printempo 1992.*

## NORDA PRISMO denove aperas

Dum la jaroj 1954-74 la plej populara esperanto-revuo estis *NORDA PRISMO*, aperinta en Svedio, kaj ĉesinta en Finnlando pro ekonomiaj kaŭzoj. Post relative longa paŭzo la revuo nun denove aperas en la kadroj de Nordia-Balta esperantista kunlaboro. La eldonanto estas Oy Mendoservo en Finnlando, kunlaborantoj ĉefe verkistoj kaj poetoj de la juneta generacio, sed ankaŭ jam mondkonataj aŭtoroj. La revuo aperas kvarfoje en jaro.

La numero 1/92 havas 40 paĝojn en formato A-5, kaj havas la subtitolon "Kultura revuo pri Nordio en Esperanto", kvankam oni iom larĝe difinas "Nordion". Tamen la eldonantoj estas finnaj kaj la revuo estas presata en Tartu, Estonio.

Jarabono laŭ la adreso de Oy Mendoservo (Kivistöntie, SF-05510 Hyvinkää, Finnlando) kostas 48 FIM, pere de UEA 24 NLG.

*laŭ Informilo de EAE, 1,2/92*

## Jubileo de KONCIZE!

*Koncize* estas la dumonata komuna bulteno de pluraj junularaj Esperanto-Asocioj, kiu nun festas sian 100-an numeron!

Antaŭ dekkelkaj jaroj (?) estis decidite eldoni ian komunan revueton ĉefe kun aliĝiloj kaj informoj pri diversaj aranĝoj kaj junularaj aferoj. Tiu maniero de informo-distribuo estas ja fakte multe pli utila kaj efika, ol se ĉiu landa organizo havus iun porokazan internan informfolion. La kunlaborantajn organizojn oni nomis *Koncize-bloko*, ja ne temas pri ia formala organizo kun statuto kaj prezidanto, ktp, sed ĉiu kunlaboranta junulara sekcio havas simple la redaktoron de sia paĝo, kaj zorgas pri la distribuado de la bulteno al siaj membroj. Tekniko la aperigon prizorgas GFJ (Germana Esperanto-Junularo), kun la ĉefredaktorado de Ulrich Matthias.

En la lastaj jaroj - paralele al la revigligo kaj pliprofesiigo de la junulara movado - *Koncize* iĝis ĉiam pli populara. Ĝis 1990. al la bloko apartenis la junularaj asocioj de Britio, Flandrio, Finnlando, Francio, Germanio, Italio, Nederlando kaj Svislando, - kaj en 1991. alligiĝis tiuj de Aŭstrio kaj de Hungario (... la unua el la ekssocialismaj landoj...)

## Pri historio kaj lingvaj konfliktoj en Bad Saarow

26 iamaj aktivuloj de GDREA (Esperanto Asocio de GDR) sekvis la privatan inviton de d-ro Detlev Blanke kaj partoprenis renkontiĝon de la 27a ĝis la 29a de marto en Bad Saarow, en la gastodomo kaj seminariejo de Kulturligo, tradici-riĉa por esperantistoj.

La celo de la renkontiĝo estis (krom la deziro revidi malnovajn amikojn): a) pens-interŝanĝi pri problemoj kaj principoj de verkota historio de GDREA; b) rekuraĝigi kelkajn iam tre aktivajn esperantistojn al la daŭrigo de ilia poresperanta laboro; kaj c) informi pri la aktualaj lingvo-problemoj kaj konfliktoj en Eŭropo.

La vicprezidanto de GEA, d-ro Ronald

Löttsch, la prezidanto d-ro Till Dahlenburg kaj la eksekretario de GDREA d-ro Detlev Blanke ankoraŭfoje informis pri la lastjara unuiĝo de GDREA kaj GEA substrekte, ke la relative senkonflikte kaj bonetose realiĝinta unuiĝo vere pravigas, ke pli ol ĝis nun el la multaj iamaj membroj de GDREA venku certan hezitemon kaj aliĝu al GEA.

Dum tiuj programplenaj tagoj ne nur evidentiĝis, ke oni bezonas verkon pri la historio de GDREA, sed jam montriĝis la unuaj atentindaj partaj aktivecoj.

*Detlev Blanke, Berlino  
laŭ Esperanto Aktuell 4/92.*



*Detlev Blanke, Berlino  
laŭ Esperanto Aktuell 4/92.*

*Koncize* atingis la jubilean, 100-an numeron. Gratulon al GEJ, al la ĝisnunaj, kaj al la nuna redaktoro Ulrich Matthias! La revuo cetere estas ankaŭ abonebla kontraŭ 14 germanaj markoj jare ĉe GEJ. Pliaj informoj:

*GEJ, Rheinweg 15, D-W-5300 Bonn 1.*



## Aranĝoj

### 4-a BIERo



La Munkena Esperanto-Junularo invitas al la 4-a BIERo (Bavara Internaci-Etosa Renkontiĝo) de la 17a ĝis la 20a de septembro. Oni vizitos la urbon Munkeno kaj la faman Oktobro-feston,

klaĉos, ludos, diboĉos...


La kotizo estas 50 DEM (ĝis 31.08.92.), alilandanoj ricevos rabaton ĝis 100 %. Petu aliĝilon de:

Munkena Esperanto-Junularo,  
Postfach 200803 München-2, Germanio.  
Koncize 3/92.

### Popolarta Foiro en Mezötúr (Hungario)

kun Internacia Esperanto-Renkontiĝo

Ĝi okazos en sudorienta parto de Hungario, de la 27-a ĝis la 31-a



de aŭgusto 1992. La kотиzon - ĉ. 6000 Ft-oj, kiu inkluzivas tranoktadon, manĝojn,

ekskursojn kaj diversajn programojn - oni povas pagi antaŭe aŭ surloke. Pliajn informojn petu ĉe:

S-ino Sándorné Deák, H-5400 Mezötúr,  
Ifjusági lakótelep 16-os ép. fsz.2. Hungario.

### Por atento de organizantoj de esperantaj aranĝoj!

Se Vi volas aperigi informon pri via aranĝo, bv. sendi materialon laŭ la supraj modeloj. Pri okazintaj renkontoj prefere sendu foton, kaj maksimume (!) duonpaĝan resumon!

### Mitoj kaj faktoj pri esperanto

Seminario kun prelegoj de sumaj esperantoverkistoj kaj lingvospecialistoj:

Jacques Farjon de l'Agâtinerie - eksinterpretisto ĉe NATO, Germanio; Pierre Janton - profesoro ĉe la universitato de Clermont Ferrand, Francio; Claude Piron - profesoro ĉe la universitato de Genève, Svislando.

Kun debatebleco kaj libroservo. La studotago okazos sabaton, la 5-an de septembro 1992. en la universitata historia kunveno "Het Pand", en la organizo de la Genta Esperantogrupo *La Progreso*.

La kotizo inkluzivas la tutan programon, la resumojn de la prelegoj, la varman tagmanĝon kaj la trinkaĵojn dum la paŭzoj.

Pli da informoj ĉe:

de Patrick Haerick.  
Zilverberklaan 25 B-9032 Gent,  
tel. +32-91/270215.

el Informilo de FEL-aktivuloj, aprilo/92.

### Unua Atlantika Plonĝado en Portugalio!

18-21 septembro, Cacela

Portugala Esperanto-Junularo ĝojas inviti vin al la 1-a Atlantika Plonĝado. Ĝuu la baldaŭan somerfinon (oj!) ĉe la orsabla kaj ŝaummara plaĝo en amuza junesperanta etoso!


La programon konsistigos ŝipetaj ekskursoj, amuzoj, koncerto de la rokbando *Viskio-sauroj* (inkl. originalaj esp-kantoj!), surplaĝa futbalkonkurso ĉe la sunfalo portugaloj x eks-terlandanoj (ja ni venkos!), ktp.

La neeviteblaj kotizoj inter 40 kaj 100 NLG depende de via luksodeziro (ĉu tendo aŭ ĉambro).

Venu ankaŭ vi *okcidenten* por renkonti junajn portugalesperantistojn!

Pli detalane aliĝilon vi povas peti ĉe:

Portugala Esperanto-Junularo  
Rua Dr. Joao Couto 6 r/c A,  
P-1500 Lisboa, Portugalio.




Nordiaj Esperanto-Asocioj kaj la organizo *Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo* invitas Vin al la seminario

### Minoritataj Popoloj kaj lingvoj en Nordio - Lingvo-problemoj en Eŭropo

de la 30-a de oktobro ĝis la 2-a de novembro 1992. en Kungälv, Svedio. La organizantoj atendas kompetentajn ekspertojn pri la temo kaj celas diskutigi vin pri evoluproblemoj de la lingva bunteco en Eŭropo, inkludante esperanton. Informiĝu pli detale ĉe:

Martha Andreasson, L. Tolsereids vag 2265,  
S-42642 Hisings Karra, Svedio.  
laŭ Esperanto Aktuell, 4/92.



## Recenzoj

Schwarz, Adolf (red)

### Survoje al Internacio de Proleta Esperantistaro

Faktoj, dokumentoj, rememoroj. Sofio, Eldonejo Pres-Esperanto, 1992. 223 p.

La libro entenas dokumentojn el diversaj laboristmovadaj esperantistaj revuoj, kiuj ri-

latas al la historio de SAT kaj aparte (p. 56-192) al la komunisma opozicio en SAT, kiu fariĝis en 1932 en Berlin la *Internacio de Proleta Esperantistaro* (IPE).

Adolf Schwarz el Flensburg kolektis la materialon laŭ vidpunktoj de komunismemaj esperantistoj de la 20-aj/30-aj jaroj kaj bedaŭrinde malofte donas precizajn fontindikojn. La pozicion de SAT pri la priskribita evoluo li ne prezentas per SAToriginalaj vidpunktoj. Se Schwarz estas fakte la diligenta materialkolektinto, la vera redaktoro estas Nikola Aleksiev, kiu per bonegaj antaŭparolo kaj postparolo metas la dokumentitajn eventojn en la

konkretan historian kadron kaj faras ilin tiel pli kompreneblaj por nuntempuloj. Li ankaŭ komentas kaj kritikas provojn dum la 70-aj jaroj revivigi IPE, kiuj fine kondukis al la ekesto de *Komunista Esperanto-Kolektivo, KEK*.

Sian bonegan konkludan redaktoran eseon Aleksiev finas prave atentigante, ke "estas tute necese reprijuĝi la tutan estintan agadon de la landaj kaj internaciaj laboristaj esperanto-organizoj". Kvankam la libro havas gravajn mankojn, ĝi tamen povas esti helpilo por pluaj sed pli sciencaj studoj.

Detlev Blanke, Germanio

## Lingvo

### Pri la pronomo "ci"

En Starto 5/91 mi trovas poemeton, tradukitan fare de F.V.Lorenz, en kiu la patrino estas alparolata "ci". Pri tiu ĉi pronomo ne estas tute klaraj reguloj, kiam uzadi ĝin. Tial mi citas, kion skribis Zamenhof en la "Dua Libro de la Lingvo Internacia", 1888:

"Vi" ni diras egale al unu persono aŭ objekto kaj al multaj; tio ĉi estas farita pro oportuneco, ĉar, parolante kun iu, ni ofte ne scias, kiel diri al li: "vi" aŭ "ci" ("ci" signifas la duan personon de la ununombro; sed tiu ĉi vorto estas trovata sole nur en plena vortaro; en la lingvo mem ĝi preskaŭ neniam estas uzata).

Kaj en la *Revuo*, februaro 1908, oni trovas pli detalan klarigon: La neuzado de "ci" tute ne estas senkonscia imitado de la ekzistantaj lingvoj, - kontraŭe, ĝi estas specialaĵo de la lingvo esperanto, specialaĵo bazita sur pure praktikaj konsideroj kaj esploroj. La plej bona maniero kompreneble estus, se ni al pli-ol-unu personoj dirus "vi" kaj al unu persono ĉiam "ci"; sed ĉiuj nuntempaj kulturaj popoloj tiel al kutimigis al la ideo, ke "ci" enhavas en si ion *senrespektan*, ke ni neniam povus postuli de la esperantistoj, ke ili al ĉiu unu persono diru "ci"; ni devus sekve havi apartan pronomon de ĝentileco (kaj tia pronomo efektive ekzistis en Esperanto antaŭ la jaro 1878). Sed la praktiko de ĉiuj ekzistantaj lingvoj montris, ke tia "formo de ĝentileco" estas ofte tre embarasa, ĉar tre ofte ni ne scias, kiamaniere ni

devas nin turni al tiu aŭ alia persono (ekzemple al infano ktp.): "ci" ŝajnas al ni eble ofenda, pronomo de ĝentileco ŝajnas al ni ridinde ceremonia. En tiaj okazoj oni en la ekzistantaj lingvoj uzas diversajn artifikojn, kiuj tamen tre ofte estas tre embarasaj, kiel por la parolanto, tiel por la aŭskultanto (ekzemple anstataŭ "ci" kaj "vi" oni diras "li", "oni", "sinjoro", "fraŭlo" ktp). Por forigi ĉiujn ĉi tiujn embarasojn, ekzistas nur unu rimedo: diri al ĉiu, ĉiuj kaj ĉio nur "vi". Malkomprenigon tio ĉi neniam povas kaŭzi, ĉar en la tre maloftaj okazoj de neklareco ni povas ja precizigi nian parolon, dirante "vi, sinjoro", aŭ "vi ĉiuj", "vi ambaŭ" ktp. Por la personoj, kiuj tre sentas la bezonon de "ci" (ekzemple kiam ili sin turnas al Dio aŭ al amata persono), la uzado de "vi" ŝajnas neagraba en la unua tempo (tiam ili ja havas la rajton uzi "ci"), sed post kelka praktiko oni tiel facile alkutimigas al la uzado de "vi", ke ĝi perfekte kontentigas kaj oni trovas en ĝi absolute nenion "malvarman". Ĉio dependas ja nur de la kutimo.

Por ke oni ne klarigu al si tro libere la lastajn vortojn ankaŭ por aliaj kazoj, mi citas el Originala Verkaro, p. 66 supre "... ke ĉiuj perfektigoj en la lingvo Esperanto estu farataj ne per rompadaj kaj subitaj decidoj, sed sur vojo natura, per riĉigado de la literaturo kaj per ŝtupa elpuŝigado de formoj malbonaj per formoj pli bonaj."

Laŭ mia opinio, la uzado de "ci" kaj "vi" estas simila al la anglaj "thou" kaj "you". Antaŭ iu tempo mirigis min aserto de fejetonisto en la ĉeĥa televida gazeto, laŭ kiu "en la angla lingvo oni alparolas ĉiun unuopulon ci."

Adolf Stanura, laŭ Starto 1/1992.

## Alvoko!

### Alvoko pri instruisto-borso

Instruistoj, kursgvidantoj, kiuj estas kompetentaj kaj entreprenemaj gvidi kursojn en diversaj landoj, bonvolu anonci vin ĉe ILEI!

Kelkfoje venas deziroj havi eksterlandan kursgvidanton. Pro tio necesas, ke la koncerta respondeculo de ILEI havu je dispono nomojn, adresojn kaj informojn pri vojaĝemaj gekolegoj. Kiu volonte reagas je tiu ĉi alvoko, bv. letere komuniki la jenajn indikojn:

Nomo, adreso kaj telefon-numero. Gepatra lingvo, aĝo. Esperantaj ekzamenoj (tipo, grado). Profesio, fakoj, ĝisnuna instruagado. Nivelo de kurso prefere gvidota. Metodaj, lernolibroj, instruiloj prefere aplikotaj. Sezonoj en la jaro libera por vojaĝi, dum kiom da tempo. Kiaj kondiĝoj estas postulataj. Aliaj indikoj rilataj.

ILEI unuavice celas peri inter serĉantoj kaj sinproponantoj. Subvencii kurson aŭ kursgvidanton ILEI apenaŭ povas, nur en tre malmultaj kaj la plej indaj kazoj. Do, kontrakto aŭ interkonsento devas estiĝi inter la kursorganizanto kaj la kursgvidanto.

Vian sinanoncon bv. direkti al:

Internacia Ligo de E-Instruistoj,  
S-ino Barcsay Suzsua,  
Bem rkt. 25/B, H-1011 Budapest.  
Hungario

## Movada lernejo

### Amikeca Reto

La Amikeca Reto de SAT estas kulturo-kaj sociokontaktiga servo esperant-lingva. La membroj de la reto ĉeestigos vin al esperantistaj kunvenoj kaj multaj interesaj lokoj en la mondo, kaj montris al vi la ĉiutagan vivon de si mem kaj de la loka loĝantaro. La adreso en kajera formo aperas ĉiujare, kaj enhavas ĉ. 300 adresojn el pli ol 30 landoj.

Baza prezo de la adreso estas 30 francaj frankoj, sed ĝi varias laŭ regionoj.

#### Regionaj perantoj:

Argentino: Orellana Rojas Atilio, Casilla de Correos 1428, RA-5000 Cordoba.

Aŭstralio: Wearing Max, 30 Westbury str., AUS-5069 Hackney -SA.

Brazilio: Joao Manoel Aguilera, Caixa Postal 5232, BR-CEP-19031 Campinas-SP

Britio: Alan Gould, Woodrising, Thornlane, Goxhill, GB-South Humberside, DN 197 LU.

Bulgario: Dimitrov Biser, str. Aleko Konstantinov 14, BG-9200 Provadija.

Ĉeĥoslovakio: Miroslav Zavodsky, Csl. Brigady 67, CS-01004 Zilina-Zavodie.

Hungario: Aukstikalnyté Rozé, H-6500 Baja, Kólcsey u. 72. II/7.

Israelo: Jeremi Gishron, pk 23180, IL-91231 Jerusalemo.  
Japanio: Joel Brozovskiy, EPA, Oomoto, Kameoka-si, J-Kyoto-h, J-621.

Kanado: Reni Porter, 71 Ridgevalley Rd, CDN-Halifax, Nova Scotia, B3P2E5.

Polio: Stanislaw Rybicky, skr. pocztowa 342, PL-20950 Lublin 1.

Rusio: Aleksander Griŝenko, ul. Šadenko 22/4, 348005 Vorosilovgrad.

Turkio: Enver Yalcin, Klodfahner caddesi Coskun apr. n 27, apr. n°27, Sultanahmet, TR-Istambul.

La Amikeca Reto de SAT funkcias paralele al Pasporta Servo de TEJO, sed ĝi ne estas senpaga gastigeblo!

"Vi lernis esperanton por intimiĝi kun aliaj mondanoj. Malfeliĉe, vi ne scias kiel tion realigi. Ekster la kongresoj, vi ne scias kion fari por ligi firmajn kontaktojn kun alilandaj samideanoj.

La Amikeca Reto estas servo, kies celo estas permesi ĉiaspecajn amikecajn rilatojn. Ĝi celas fundajn neordinarajn vizitojn, nekutimajn aktivecojn aŭ diskutojn."

Por uzi la liston "esperantistiĝo minimuma" estas evidenta kondiĉo. Per tio ni komprenas bazan uzkapablon de nia lingvo, sed ankaŭ fortan emon al ties disvolvigo. La interna ideo de Zamenhof estis la cemento de Esperantio, kaj ĝi estu la cemento de nia Reto. Por tiuj vortoj ni deziras forpuŝi ĉian ideon de egoisma profito sur dorso de iaj bonkoraj Servo aŭ Turisma Agentejo. La Amikeca Reto drolotas la


homojn, kiuj esperantistiĝis por iamaniere iom plibonigi nian planedon..."

#### Centra adreso:

Amikeca Reto, 63 rue de la République á Chargé, F-37530 Amboise, Francio.

#### Adreso de SAT:

67 Ave. Gambetta, F-75020 Paris, Francio.



alia Turismo al alia Mondo

## Esperanto en radio

### “DX-ado” kaj mond-radioaŭskultado

En la radioamatora faklingvo la vorto *DX* signifas longdistancon radio-kontaktan. Multaj personoj (inter ili ankaŭ multaj esperantistoj) havas la hobion kapti kiel eble plej multajn, kaj plej foran radioprogramon. Tiu hobio estas nomata *DX-ado* aŭ “*mond-radioaŭskultado*”. La mond-radioaŭskultanto kompreneble havas la hobion aŭskulti eksterlandajn radioprogramojn.

Li ankaŭ korespondas kun la eksterlandaj radio-stacioj, informante ilin pri la aŭskultado de ilia elsendo, kaj pri la aŭskultita programo. Ekzistas konkursoj, kaj ankaŭ specialaj program-elsendoj por DX-uloj. La DX-ado estas utile krom la plibonigo de sia lingvoscio ankaŭ por ekhavi konkretan sperton pri teknikaj manieroj, *trukoj* por kapti forajn radioelsendojn.

La fakta *kapto* kaj aŭskulto de iu radiostacio estas konfirmata de t.n. QSL-karto, kion sendas la radiostacio al la aŭskultanto. La QSL-karto estas bela poŝtkarto, sur kiu la radio-stacio konfirmas, ke la ricevinto vere aŭskultis ilian programon. Por ricevi la konfirmkarton, la radioaŭskultanto devas skribi raporton pri aŭdebleco (signalforto, klareco, alfiltrigo de najbaraj stacioj, fado ktp.), informi pri sia aparato kaj priskribi la enhavon de la programo. Ricevinte la raporton, la radio-stacio kontrolas la priskribitan enhavon kaj sendas konfirmkarton al la aŭskultanto.

Mond-radioaŭskultantoj kolektas konfirm-



kartojn kaj nombras, kiom da stacioj en kiom da landoj ili aŭskultis. Ili ankaŭ aranĝas konkursojn pri DX-ado.

Raportoj pri aŭskultado estas tre utilaj por la radioteknikistoj, ĉar pro la indiko de aŭskultebleco ili scias, ĉu daŭre sendi en la sama frekvenco aŭ ĉu ili devas ŝanĝi frekvencon. La raportoj estas utilaj ankaŭ al la redakcianoj, ĉar per la raportoj kaj leteroj la redakcioj scias, ke homoj vere aŭskultas iliajn programojn.

En la kurtonda bendo estas milo de radioelsendoj. Provu ankaŭ Vi kapti kaj identigi ilin! Krom la agrabla amuzo ĝi estas utila ankaŭ por vi, ĉar post iom da ekzercado vi pli facile kaptos ankaŭ la esperantlingvajn elsendojn!

*surbaze de La Espero (SEF) 2/92.*



### Ĉu esperantistoj rajtas finance profiti de la Movado?

(Aperis en n-ro junio-(2)-92).

Kiam Sándor Hideg priskribas sian ekzemplon de tiu eta hotelestro, mi tuj ŝatus diri: jes, kial ne? Se ni ĉiamaniere provas interesigi grandajn kaj malgrandajn firmaojn por uzi esperanton, oni ja ne povas aldoni, ke la servoj/varoĵo estu rabatitaj se la klientoj estas esperanto-parolantoj. Oni ja ankaŭ ne diras, ke aliaj interesatoj kiuj parolas alian lingvon, kia ekz. la rusa aŭ la angla ktp. estas pli bonvenaj. *Temas do pri tio, ke oni profitas ne de la Movado, sed profitas la eblecon, kiu estas disponebla ankaŭ al ne-esperantistoj.* Mi pensas, ke oni devas vidi ĉi tiun aferon inverse: la fakto ke oni parolas esperanton, havas la avantaĝon (ne la profiton!) ke oni pli facile povas kontakti alilandajn entreprenojn. Tiuj entreprenoj pro la fakto ke ili uzas (ankaŭ) esperanton konstante kontribuas al la kontinuo de la Movado.

Alia afero estas, ke ni ne sufiĉe bone scias, kiom da entreprenoj uzas esperanton, kaj mi volonte apogus proponon, ke ni zorgu, ke tiuj entreprenoj uzu pli bone la konatajn E-kanaĵojn, kiel la revuoj, gazetoj, la UEA-jarlibro, ktp. kompreneble kontraŭ la normala anoncprezo.

*ing. T. Kanter, Nederlando*  
\*\*\*

Ŝajnas al mi, ke oni ja penu bondeziri okaze de la plej gravaj festoj de la plej gravaj religioj - tiuj festoj, kiuj elvokas bondezirojn interhomajn (same kiel la kristanaj Kristnasko kaj Pasko). Multaj festoj estas notitaj en “*La Jaro*” de MONATO. Tamen mi opinias, ke la plej valora esperanto-festo estas la “*Semajno de Internacia Amikeco*”, SIA.

La festo okazas ĉiujare dum la lasta kompleta semajno de februaro. Dum tiu periodo oni sendu bondezirojn al eksterlandaj amikoj. Mi mem uzas bildkartojn sen presita bondeziro, en kiujn mi metas folion kun la insigno, moto kaj “*Kun bondeziroj okaze de la Semajno de Internacia Amikeco*”. Antaŭ kelkaj jaroj UEA havis stokon de kartoj presitaj de UNESCO sed tiuj ne plu ekzistas.

Eble ni menciu, ke SIA estis ideo de svedo Erik Carlen, kiu mortis en 1987.

*Henry D. Palmer, Britio.*

*Laŭstatistike la plej grandaj religioj estas la islamismo kaj budhismo. Mi dubas, ke la Eŭropaj legantoj de EVENTOJ akceptus favore la bondezirojn je islamaj festoj, kaj inverse, eĉ ne parole pri la same multnombraj ateistoj...*

*La esperanto-festoj vere malmultas. Fakte do kiajn komunajn esperanto-festojn ni havas? Ni bonvenigus ĉi-tamajn leterojn de la legantoj.*  
*La red.*

\*\*\*

Ĉu mi malŝparas mian tempon? Ekde du jaroj mi studas esperanton, kiu eble helpos min en miaj specialaĵoj de jura scienco, sed nun mi

miras (Majk SADLER, Eventoj, junio (2)-92), ke la internacia lingvo estas nur “*interesa hobio*”. La kialo, laŭ SADLER, estas la malgranda vort-provizo de la lingvo kiu neas sian utilacon por scienco. Sed eĉ mi, novulo pri esperanto povas vidi, ke ĝi, esperanto estas reto de altoĵoj, tra montoj, montetoj, teraltaĵoj, kaj promontoroj el kiuj ni povas trarigardi lingvujojn.

Sendube, se ni volas, ni povas malsupreniri de altoĵoj, de tempo al tempo, por vidi kio okazas en la koterejoj de fakuloj, la temploj de altpastroj kaj la kluboj de hobiistoj. Eble ni devos lerni novajn vortojn se ni iom restas tie, sed la tasko de la internacia lingvo estas, antaŭ ĉio, komuniki inter la individuoj.

Ni devas allogi la fakulojn al la altoĵoj, kio estas esperanto. Certe restos specialistoj, altpastroj kaj hobiistoj kiuj preferos babili krokodile, interne de siaj palisaroj, sed tio estas tute alia afero.

*Dr. Stuart S. Kind, Anglujo*  
\*\*\*

### Propagando senkoste!

La lastan monaton mi troviĝis en Buljono (Bouillon), en la Belgaj Ardenoj, vizitante ties faman kastelon mezepokan kaj la t.n. “*Dukan Muzeon*”.

En budo tiea oni vendas ĉiuspecajn dokumentaĵojn prihistoriajn en la germana, franca, angla, nederlanda kaj eĉ itala kaj hispana lingvoj, sed nenion en esperanto.

Alparolante la vendistinon, mi proponis tradukojn al la internacia lingvo de kelkaj el tiuj folioj. Afable ŝi respondis, ke neniam oni petas tiajn de ŝi, kaj ne plu interesiĝis pri mia propono.

La tradukojn tamen mi faris kaj sendis al ŝi. La samon mi faris pri mia loĝurbo Namuro. Oni povas ricevi ilin tie senpage.

Nun mi turnas min al ĉiuj esperantistoj, kiuj ne, aŭ nur malbone scipovas la supre menciitajn lingvojn, unue peti pri esperantaĵoj ĉie, kie ili deziras viziti muzeon aŭ similaĵon ekster sia propra lando. Se denove neniu petas pri ili, oni forĵetos la “*paperaĵojn*” kaj jen perdiĝos denove bona okazo varbi por nia lingvo.

Alia maniero varbi por esperanto estas, al komercistoj, kiuj kutimas elmeti fremdlingvajn informojn en siajn montro-fenestron aŭ inter la vendotaj varoj, proponi vialand-esperantlingvan tradukon de tiuj varbiloj. Tio impresas kaj aspektas tre serioza. Plurfoje mi tion jam proponis, kaj preskaŭ ĉiam oni danke konsentis, ke tion mi faru. Cetere, se krome vi estas aĉetanto, estu certaj, ke via propono estos duoble bonvena.

La tujaj ferioj estu bona okazo diskonigi nian lingvon per rimedoj alireblaj al ĉiuj je nula kosto. Profitu ĝin!

*Anselmo P., Belgio.*

EVENTOJ, esperanto nyelvű információs lap.

Nyt. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X.

A kiadó és a szerkesztőség címe:

H-1675 Budapest, pf. 87. Tel.: 1288258.

Megjelenik kéthetente. Kézbesíti a HELIR.

Készült az M & M nyomdában:

H-1161 Budapest, Bercsényi u. 10.

EVENTOJ, dusemajna gazeto pri la esperanto-movado.

Eldonas Kultura Esperanto-Asocio

kaj LINGVO-Studio, Budapest.

Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro László Szilvási.

La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondecas pri la anonc-enhavo.

## Anoncetoj

Ĉu vi deziras mendi esperantajn librojn? La libroservo de ELI (Esperanto Ligo de Israelo) funkcias dum la tuta jaro. Turnu vin al Matilda Landau, tel: 03-5465649, Nordau 42, 62597 Tel-Aviv, Israelo.

\*\*\*

Subtenu Esperanton per uzitaj poŝtmarkoj, eltranĉitaj de kovertoj kaj senditaj al la adreso de Libroservo de Estona Esperanto-Asocio, EE-0012 Tallin, Mahla 65-1, Virve Ernits. Dankon!

\*\*\*

Okaze de unua datreveno de geedziĝo de gesinjoroj Sato multajn korajn gratulojn kaj feliĉojn!

Halina Pacwa

\*\*\*

Bonvolu noti!!! Ekde nun ankaŭ la SAT-oficejo posedas telekopiilon. Ĝia numero: +33-1-47977190.

\*\*\*

En la numero junio (1)-92 erare aperis la adreso de FGTEB-Esperanto. La preciza adreso: 3 rue des Brasseurs, B-5000 Namur, Belgio. Ni pardonpetas pro la eraro.

La Red.

## Videofilmoj kaj songazetoj

Son-gazetoj kaj videokasedoj estas la plej bona rimedo "alkutimigi la esperantistojn al la ekkono de nia literaturo". La Aŭdvida Centro de Sarlanda Esperanto-Ligo de pluraj jaroj surbendigas la prelegarojn de la Kulturaj Semajnfinoj, kiujn gvidis la plej konataj esperantistoj. Listo haveblas ĉe:

Oliver Walz, Postfach 2019,  
Richard Wagner Str. 38, DW-6660 Zweibrücken  
(tel.: +49-6332-49843).

Se vi interesiĝas pri videofilmoj faritaj dum la Kulturaj Semajnoj, kie prelegis Regulo, Szerdahelyi, Maas, Frank, Koutny, ktp., aŭ se vi interesiĝas pri vojaĝoj al kongresoj, mendu la videobendojn ĉe:

Gunther Becker,  
Alter Hangarten, 2, DW-6653 Blieskastel.  
el Franca Esperantisto, marto/92.



## Korespondi deziras

Mi estas studento de Reformacia Teologia Akademio. La determina sperto de mia vivo estas, ke mi ekkonis la Dion, kaj sciigis pri Jesuo Kristo, ke Li ankaŭ por mi mortis, reviviĝis kaj vivas ankaŭ hodiaŭ. Tial mi deziras korespondi kun tiuj gejunuloj aŭ gemaljunuloj, kiuj ankaŭ spertis aŭ volas sperti en ilia vivo la ĉeston de Dio, ĉi tiun feliĉan ĝojon.

P. Szabó Barnabás,  
Anna tér 4, H-8500 Pápa, Hungario.

Gelernantoj 11-15 jaraĵoj deziras korespondi grupe aŭ individue kun gelernantoj el diversaj landoj. La adreso: E-Klubo Tulipo, a.d. 9, LT-4270 Vilkauskis, Litovio.

## Interese...

### "...NE KOLERU MIN,..."

(Legajo por franduloj)

Ĉiu kursestro de esperanto ne forgesas rakonti pri la t.n. praesperanto. Vi ja scias, ke jam kiel gimnaziano, en 1878, Ludoviko Lazaro Zamenhof pretigis preskaŭ tutan planon de lingvo internacia. Ĝis tiam lia patro, Marko Zamenhof, aprobis tian "ludon" de sia filo, sed antaŭ liaj universitataj studoj li igis promesi sian filon ne okupiĝi pri tia afero ĝis la fino de la altaj studoj. Opiniante, ke li devas gardi sian filon kontraŭ vana laborado, la patro forbruligis lian manuskripton.

Antaŭ tri monatoj, en decembro 1987, en la urbeto Veisiejai (en Litovio, kie la "doktoro" kuracadis) oni trovis, en la domo de iu maljunulo, kiu persone renkontis la iniciatinton de Esperanto, malfacile kompreneblan leteron. Ĝi estis sendita al Kaunas, kie oni konstatis, ke ĝi estis skribita en praesperanto. Entuziasmaj esperantistoj rapide "deĉifris" la leteron, malkovrinte, ke tiu letero estis skribita de Marko Zamenhof al sia filo Ludoviko. La enhavo de lia letero prilumas de alia flanko la "ŝtonkor-econ" de la patro. Ekkonu tiun altvaloran relikvaĵon de nia Esperanto-movado.

"Varsovo, 1-a de Aŭgusto del anno 1879.  
Ma filo, fu-ci lingve está porda koj laŭ sa te-

29 jara esperantisto dez. kor. tutmonde kun gejunuloj pri ĉiu temo, precipe pri nifologio, natur- kaj mediprotektado, reenkarriĝo.

Dénes Pártay,  
Damjanich u. 1/I, 3/2, H-7400 Kaposvár,  
Hungario.

47 jara pensiito serĉas korespondajn kontaktojn dise en la mondo.

Csizmádia Istvánné,  
Ady E. u. 16, fsz. 6, H-5400 Szolnok, Hungario.

Ĵusa kursfinito serĉas korespondajn partnerejn. Edelza Maria Veloso Silva, Rua Pe. Barroso, 43/102; Deposito; BR-25800 Tres Rios-RJ, Brazilio.

F-ino Shirley Lauritzen, Box 90, Mount Pleasant, 84647, Usono volas korespondi tutmonde

orja fundamento. To debé maturigi fol i ta pin-toj. Trovó metodolj pu fari simplal grammatikol. Pripintó pelle fiol koj bej madza tempo, koj fan, kvan to potuj teni la egzistol de ta familjo fেকে i rica statto. Mo forbruligé la projektol de ta lingwe, pu bella futuro de ta familjo, pu inter-resso de ta lingwe univarsala. Ne koleró mol, mo está certa, ej bej annes to tabuj successolj da ta lingwe. Ta padro"

Povas esti, ke tiu - certe altvalora praesperanta letero, eble la unusola en la mondo - ne estis konceptita regule laŭ la praesperanta grammatiko, ja tiu "lingve univarsala" neniam estis finpretigita kaj eldonita.

Kaj nun legu la leteron en la nuna esperanto:

"Varsovio, la 1-an de aŭgusto 1879.

Mia filo, tiu ĉi lingvo estas oportuna nur laŭ sia teoria fundamento. Vi (ci) devas maturigi tion en viaj pensoj. Trovu metodojn por fari simplan grammatikon. Pripensu plue fojon (pluan fojon) nur post multa tempo, nur tiam, kiam vi (ci) povos teni la ekziston de via familio efektive en riĉa stato. Mi forbruligas la projekton de via lingvo, por bela futuro de via familio, por intereso de via lingvo univarsala. Ne koleru min, mi estas certa, ke post jaroj vi atingos sukcesojn per via lingvo. Via patro"

L.L.Zamenhof komprenis la intencon de sia patro. Li komencis refoje eklabori nur post 4-5 jaroj sur la pliklarigintaj teoriaj fundamentoj postrestintaj en lia memoro. La rezulton vi konas.

apokrifajo de Tibor PAPP  
laŭ Debrecena Bulteno No 43.

Ĉu Vi jam plenumis?

## INTERNACIA EKZAMENO PRI ESPERANTO

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj